nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2014

## KURSO KAJ EKSPOZICIO EN VALDEMORO

Danke al la kunlaboro de Publika Biblioteko "Ana María Matute" en Valdemoro, kaj ties direktoro s-ino Emilia Marchal Salas, oni povas prezenti al la loĝantaro de la urbo ekspozicion pri Esperanto kaj 10-lecionan kurson por komencantoj.




La ekspozicion oni malfermis en la biblioteko (Avda de España, s/n) la 24an de februaro kaj ĝi estos vizitebla ĝis fine de la monato marto. Ĝi konsistas el serio de paneloj kun informo en la hispana pri Esperanto, kaj malgranda elmontrado de esperantaj libroj, komiksoj kaj revuoj.

La kurso por komencantoj estos gvidata de Alejandro Pareja, e-isto kiu loĝas en Valdemoro, kaj daŭros 10 lecionojn. La lecionoj okazos en la biblioteko la merkredojn je la 7:30 ptm, kaj la unua leciono estos la 5an de marto. Ĝis nun aliĝis ĉirkaŭ 40 homoj, do ni esperas bonan sukceson.

Por alveni al la kursejo, krom veni per propra veturilo, oni povas uzi la buson 422. La unua haltejo de la linio en Madrido estas en Paseo de la Chopera, ĉirkaŭ 20 m el Plaza de Legazpi, apud muro de la antikva Buĉejo kaj kontraŭ la benzinejo; busoj ekiras je la 18:15, 18:30, 18:45, 19:00. La Biblioteko estas unu dombloko el la lasta haltejo de la buslinio.

Radiostacio Cadena Ser Madrid Sur intervjuis Alejandron la 24an de februaro pri la ekspozicio kaj la kurso, kaj li profitis por iom disvastigi la konon de Esperanto per tiu komunikilo kiu atingas la sudan parton de la provinco Madrido. Diversaj informoj aperis ankaŭ en retaj portaloj kaj informiloj.

Jen sube foto de Alejandro Pareja kun la direktorino de la Biblioteko dum la inaŭguro de la ekspozicio.



## "COMPARSA ESPERANTO" TRIUMFAS EN KARNAVALO

"Comparsa Esperanto" estas la nomo de karnavala muzikbando de la sevilprovinca urbo Mairena del Alcor, kiu dum la karnavalaj tagoj en februaro partoprenis festivalojn en diversaj okcidentandaluzaj urboj, inter kiuj la Kolumba Karnavalo de Onubo. Ĝi utiligas vestojn kaj maskojn rilatajn al Esperanto, kaj ankaŭ kantas kaj prezentas frazojn en la internacia lingvo. Ili interalie akiris la trian premion de la Festivalo de La Rinconada kaj la duan en Arahal.




Oni povas legi pliajn informojn pri la afero en la reta gazeto Libera Folio http://www.liberafolio.org/2014/karnavalantoj-en-hispanio-trovis-la-verdan-stelon.

## MADRIDANOJ EN LA HISPANA KONGRESO

Pli ol cent homoj jam aliĝis al la 73a Hispana kaj 18a Andaluza Esperanto-Kongreso en Arundo (Ronda, Malago, inter la 1a kaj 4a de majo): Inter ili pli ol 20 madridanoj.

Eblas koni ĉiujn detalojn pri tiu renkonto ĉe http://arundakongreso2014.wordpress.com/.

## POR APOGI LA GRUPON

Memoru ke plej bona maniero apogi la Esperanto-movadon estas aligi la lokan grupon. Kontaktu kun Madrida Esperanto-Liceo por koni la (tre facilan) proceduron. La jara kotizo plu restas je 12 €, pagebla en la konton de MEL. Tiu ĉi momente restas ĉe la banko Sabadell; la kontonumero, kun la nova sistemo IBAN estas: ES75 0081 7110 9800 0126 6730; aŭ rekte kontaktu kun iu ajn membro de la estraro.

## POR RESTI INFORMITAJ

La kutimaj kunvenoj de MEL, plu okazas ĉiulunde post la 18,30. Krome, plu daŭras la kutimaj babilrondoj la unuajn sabatojn de ĉiu monato. Ankaŭ eblas akompani la lernantojn de Juan del Castillo en la *Centro La Tabacalera*, kiuj rendevuas post la klaso, la sabatojn matene, en apudaj trinkejoj.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj kaj detaloj pri renkontoj kaj aliaj vizitu regule la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/ kaj la retejon de MEL ĉe la adreso http://www.esperanto.es/mel.

Memoru ke estis kreita grupo en la socia retejo Fejsbuko (Facebook), por esperantistoj loĝantaj en Madrido kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kiu jam entenas pli ol cent membrojn. Se vi partoprenas tiun reton, jen ĝia adreso: https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com